

La lingva situacio en la hodiaŭa mondo, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 545, 1974.03.20 & 23

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Nia pasint-semajna prelego prezentis historian raporton pri la evoluo de la lingva situacio en la diplomaciaj rilatoj. Tre resume ni rememorigu, ke la franca anstataŭis la latinan kiel parolata interlingvo okaze de la Vestfalia Kongreso, kiu konkludis la tridekjaran militon (1618-1648). La hegemonio de la franca lingvo daŭris ĝis la fondo de Ligo de Nacioj en 1919. Kunvivis ekde tiam la franca kun la angla en ĉiuj mondorganizaĵoj. En 1945 la nova mondorganizaĵo Unuiĝintaj Nacioj adoptis 5 oficialajn lingvojn, kiuj estas tiuj de la venkintoj de la dua mondmilito. Ili estas laŭ alfabeto ordo : la angla, la ĉina, la franca, la hispana kaj la rusa. Fakte ĝis 1971 la ĉina estis neglektata. Estas nur kiam la pekina delegacio anstataŭis la tajvanan por reprezenti Ĉinion, ke la ĉina fakte ne plu povis esti malatentata. La azianoj kaj afrikanoj sentis tiun ŝanĝon kiel la finon de la okcidenta hegemonio. De tiam oni ekparolis pri troa reprezentado en UN de la okcidentaj lingvoj kaj nesufiĉa reprezentado de la aziaj kaj afrikaj lingvoj. En 1973 la oficialigo de la araba kiel sesa lingvo de UN ne komplete riparitis tiun maljustaĵon.

A.- Ĉiu objektiva observanto rimarkas, ke fakte nur tri etnaj lingvoj havas vere internacian karakteron. En UN ili estas la oficialaj lingvoj de preskaŭ la duono de la registaraj delegacioj. Tiuj tri lingvoj viciĝas jene laŭ la nombro de siaj denaskaj parolantoj : Unue venas la angla kun 333 milionoj da parolantoj ; due la hispana kun 192 milionoj da parolantoj ; trie la araba kun 109 milionoj da parolantoj.

Cl.- Fakte la hispana kaj portugala lingvoj estas ege parencaj. Ofte oni konsideras ilin kune kiel formantaj unu solan lingvo-grupon. Tiam ili reprezentas 300 milionojn da parolantoj.

A.- Tiuj tri lingvoj ne povas foresti de mondorganizaĵoj, kies laboro estas bazita sur la uzo de la plej gravaj etnaj lingvoj. Kun la adopto de la araba lingvo UN rekonas tiun fakton.

Cl.- Ekzistas poste duarangaj etnaj lingvoj. Ili ludas en sufiĉe vastaj regionoj gravan kulturan rolon kaj estas uzataj kiel interlingvoj en siaj respektivaj influ-teritorioj. Jen la viciĝo de tiuj lingvoj laŭ la nombro de siaj denaskaj parolantoj. Unue venas la ĉina kun 605 milionoj da parolantoj ; due la rusa : 206 milionoj da parolantoj ; trie la hindia : 192 milionoj da parolantoj ; 4-a la germana : 120 milionoj da parolantoj ; 5-a la bengala : 108 milionoj da parolantoj ; 6-e la japana : 105 milionoj da parolantoj ; 7-a ni listigas la francan kun nur 80 milionoj da parolantoj, kaj eble antaŭ ĝi devus viciĝi lingvoj el Azio, kiujn ni ne registris. Tio atestas, ke la nuna statuso de la franca en UN estas minacata.

A.- Kial lingvo kun nur 80 milionoj da parolantoj estas registrita kiel oficiala, dum lingvoj multe pli parolataj ne estas konsiderataj ? La kaŭzo estas historia : la franca estis la lingvo de granda imperio. Tiu imperio malaperis. Nun estas fakto, ke franclingvano, kiu volas partopreni la internacian vivon, devas lerni la anglan. La kontraŭo ne estas. Tio tuj atestas, ke ambaŭ lingvoj ne havas saman internacian statuson.

Cl.- Fariĝas pli kaj pli videble, ke se la franca lingvo restas oficiala lingvo de UN, tiam oni ne povos malhelpi la multiĝon de tiuj lingvoj : ankaŭ la uzo de la hindia, de la germana, de la bengala, de la japana sin trudos. Eble ankaŭ la svahila kaj la bantua estos proponataj de la afrikanoj. Ankaŭ la persa kaj aliaj aziaj lingvoj devos esti konsiderataj.

A.- Tiu multiĝo de oficialaj kaj laboraj lingvoj ne povos efektiviĝi en la praktiko. Ilia oficialiĝo en UN estus nur teoria. Ĝi ne kondukus al praktika rezulto en la faktoj.

Cl.- Laŭ tiu analizo oni povas antaŭvidi, ke pli kaj pli uzataj en la mondaj kunvenoj estos la tri internaciaj etnaj lingvoj angla, hispan-portugala kaj araba. La ĉinoj eble povos trudi sian lingvon pro sia nombro, sed ili ne povos devigi la aliajn gentojn ĝin uzi. Same estos por la rusoj. Jam la satelitaj landoj de Sovetio prefere uzas la germanan aŭ anglan kiel interlingvon. La franca devos rezigni je sia rango de internacia lingvo.

A.- En la internaciaj regionaj kunvenoj la situacio estos tute alia. Tiam la duarangaj etnaj lingvoj kiel la ĉina, la rusa, la hindia, la germana, la bengala, la japana kaj la franca, laŭ la kongresloko, ludos gravan rolon. Kaj aliaj lingvoj ankaŭ devos esti konsiderataj.

Cl.- Konklude ni diru, ke por la mondaj rilatoj ni tre verŝajne iras al trilingvismo angla – hispan-portugala kaj araba. Ĉiuj ceteraj lingvoj estas nesufiĉe disvastiĝintaj geografie por resti mondskalaj interlingvoj.

A.- La venontan semajnon ni provos montri eblajn lingvajn evoluojn, kiuj karakterizos la dudek venontajn jarojn, ĉiam mezurante la ŝancojn de Esperanto.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!